

Raporto pri la laboro kaj financoj de la retejo edukado.net

Publika versio – sen la detala financa raporto

Estimataj membroj de edukado.net, subtenantoj de la paĝaro,
Sube vi povas legi la raporton de la jaro 2015 pri la laboro kaj financaj aferoj de la Fondaĵo edukado.net.

I. ATINGAĴOJ KAJ ARANĜOJ EN 2015

Ĉi-sube vi trovas liston pri la plej gravaj agoj kaj taskoj, kiujn nia teamo efektivigis dum la jaro 2015. La menciitaj aranĝoj kaj produktoj plej ofte estos raportitaj ankaŭ pli detale kaj/aŭ vi trovas ligan al detalaj raportoj en la paĝaro mem.

- *Organizado kaj efektivigo de la Kvara Tutmonda Ekzamentago, (aprilo-majo 2015, kun 116 ekzamenitoj en 3+13 lokoj de deko da landoj).* <http://edukado.net/ekzamenoj/ker/tutmonda/kvara>
- *Partopreno en la kreado de nova kursmaterialo de uTalk, kunlabore kun la brita entrepreno EuroTalk. Per ĝi Esperanto lerneblas per modernaj elektronikaj aplikaĵoj elire el 128 lingvoj. La apero de Esperanto sur la paletro de la entrepreno estas grandega reklamo por nia lingvo.* <http://edukado.net/novajhoj?id=556>
- *Sukcesa fino de la trijara Grundtvig-projekto* (<http://edukado.net/grundtvig>)
- *Aperigo de pluraj kulturaj kursoj en la liberaj kursoj de la KLERIGEJO: kursoj pri Frislando, Hungario, Pollando kaj Germanio. Ili estis finproduktoj de la Grundtvig-projekto, en kiu nia paĝaro partoprenis* <http://edukado.net/klerigejo/13?m=superrigardo>
- *Partopreno en la Tria Tutmonda Kolokvo pri Instruado de Esperanto (Svislando). K. Kováts dufoje prelegis.* <http://edukado.net/novajhoj?id=545>
- *Partopreno kaj prelegoj en la ILEI¹-konferenco en Oostende, Belgio.*
- *UK² – Lillo: paroligaj kursoj pri Esperanto en du niveloj, sume en 16 lecionoj, tage por po 160 personoj; lingvokurso pri la franca lingvo por po 40 personoj tage; prelego pri uTalk dum la Tago de Lernejo; KER-ekzamenoj, okazigo de la METIEJO, renkontiĝo kun la membroj de edukado.net, preparo kaj prezento de la 8-panela jubilea ekspozicio pri la KER-ekzamenoj.* <http://edukado.net/novajhoj?id=559>
- **Kampanjoj por la Eŭropa Tago de Lingvoj** – sukceso ĉe la Instituto de Modernaj Lingvoj sur kies hejmpaĝo aperis esperantlingva afiŝo, kaj dudeko da Esperanto-prelegoj kaj programoj estis registritaj <http://edukado.net/novajhoj?id=571>
- **Organizado de skajpa lingvofestivalo ĉe edukado.net.** La lecionojn pri la itala, franca, ĉina, vjetnama, islanda, rumantsch grischun kaj okcitana lingvoj partoprenis entute 35 diversaj personoj. <http://edukado.net/novajhoj?id=572>
- *Kampanjo por registri kursojn en la KURSEJO (en la lastaj tri monatoj de la jaro ekestis pli ol 100 novaj registraĵoj)*
- *Limigo de la aliro al la sekcio Instrumaterialoj – kun la celo instigi la kolegojn registri siajn kursojn*
- *Ni enpanteonigis 13 novajn premiitajn instruistojn de Esperanto kaj entute aperis 22 novaj panteonanoj en 2015* <http://edukado.net/novajhoj?id=592>
- *Laŭ peto de ESF³ kaj UEA⁴: gvidado de la stipendia komisiono por la studentoj de Poznan. Aktiva subteno de studentoj, sukcesa kolektado de monhelpo por la studentoj.* <http://edukado.net/novajhoj?id=494/> kaj <http://edukado.net/helpu/poznan/>
- *Tutjara manaĝado de la RITE⁵-kursanoj, kies materialoj kaj produktoj riĉigas nian kolekton*
- *Okazigo de pluraj retaj RITE-konsultiĝoj, inter ili unu pri la programo DUOLINGO. Serĉado de eblo kiel enmovadigi la novbakitajn lernantojn. (Solvo trovita, legu pri Ekparolu!)*
- *Prelegoj/informado kaj varbado pri edukado.net: Herzberg, Neuchâtel, Oostende, Lillo, Le Touquet*
- *Lingvokurso kaj ĉeesta RISKO-ludo dum la Eŭropa Rendezuo (novembro, Le Touquet, FR)*

- *Lingvokurso por tutkomencantoj en semajnfina aranĝo de Esperanto Nederland, fine de oktobro en la*

¹ ILEI: Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

² UK: Universala Kongreso

³ ESF: Esperantic Studies Foundation

⁴ UEA: Universala Esperanto-Asocio

⁵ RITE: Reta Instruista Trejnado ĉe Edukado.net

urbo Heerlen, Nederlando

- Konstruigo de novaj funkcioj en la KURSEJO, rearanĝo de la raportado pri la lerniloj kaj ties statistika parto.
- Akiro de kelkaj regulaj subtenantoj kaj danke al ilia malavara mondonaco dum tri jaroj ni povas certi pri enspezo de po ĉ. 4000 eŭroj jare. <http://edukado.net/prie/subteno/regulaj>
- Monkolekta kampanjo jarfine kun tombolo. Alvenis 4450,28 eŭroj de 30 personoj. Ni donas tombolobileton post ĉiu 30-eŭra pago. Nun estas 133 tombolbiletoj kaj por ĉiu deko unu donaco.
- Laborkunsido de Veronika Poór (ekde printempo 2016 la nova ĝenerala direktoro de la Centra Oficejo de UEA) kaj Katalin Kováts pri la ontaj kunlaboroj, precipe pri la KER-ekzamenoj.
- En decembro UEA-delegacio (Veronika Poór, Katalin Kováts kaj Zsófia Kóródy) vizitis en Budapeŝto ITK (ekzamencentro) kaj ekkonis ties novan direktoron. Novaj planoj kaj kunlaborebloj montriĝis, inter ili Malferma Tago de ITK dum la UK en Nitra. <http://edukado.net/novajhoj?id=595>

II. STATISTIKOJ PRI LA RETEJO

La paĝaro fine de 2015 havis entute 4138 membrojn, kiuj venas el el 128 diversaj landoj.

Ene de la lastaj 12 monatoj aliĝis al la retejo **354 novaj membroj**, ĝenerale tage minimume unu nova persono aliĝas al la komunumo.

Statistikon pri la lingvonivelo, profesio kaj aliaj detaloj pri la membroj vi povas trovi ĉi tie: <http://www.edukado.net/prie/sinprezento/statistiko?tipo=uzantoj>

La statistika parto ebligas vidi multajn informojn pri la agado de la paĝaro kaj pri la membroj kaj iliaj uzkutimoj. La belaj grafikaĵoj allogas al analizo. Precipe utilaj kaj ofte vizitataj estas la statistikaj informoj pri la lerneja kaj movada instruado de Esperanto.

NUR KELKAJ CIFEROJ:

Laŭ la mezuriloj inter julio 2009 kaj la fino de 2015 estis entute:



4138 (ĝis 2014 estis 3796) **registriĝoj**; *

143 780 (ĝis 2014 estis **109 496**) **ensalutoj**;

9 226 092 (ĝis 2014 estis **627 6442**) **vizititaj paĝoj**;

962 258 (ĝi 2014 estis **721955**) **vizitantoj**.


- La plimulto de la ensalutoj okazas pro la ĉiutaga ludo en Risko.
- Dum la jaro aliĝis entute 95 novaj ludantoj, kaj fine de 2015 estis registritaj 752 ludintoj.
- En 2015 estis 38 048 ensalutoj, tio signifas tage averaĝe 104 okazojn (en 2014 estis 41 657, sekve observeblas falo en la ensalutoj, kion klarigas ke ni liberigis la legadon de la novaĵoj, por kio oni ne plu bezonas ensaluti)
- En tiu unusola jaro la paĝaro havis 264 142 **vizitintojn** (en 2014: 248 602),
- ili vidis ĉ. 3 220 297 (en la jaro 2014: **2 335 013**) paĝojn, **(+ 885 284 kompare al la jaro 2014)** kaj
- la pli ol 800 ekzercoj estis elŝutitaj **18562 fojojn**.



ENSALUTOJ

Multaj el la sekcioj estis kaj estas libere viziteblaj, t.e. sen ensaluto oni povas uzi ilin. Ĉar la efektivan intereson nur tiel eblas vidi, se ni scias, kiuj venas konscie kaj serĉas materialojn, ni klopodis instigi la membrojn pere de anoncoj kaj petoj, ke ili ensalutu regule, kiam ili uzas la retejon, eĉ tiujn paĝojn, kie la ensaluto ne estas deviga.

Malgraŭ tio, bedaŭrinde, la kutimo ensaluti ankoraŭ ne estas tre forta ĉe la membroj.



MEMBROJ LAŬ LANDOJ

Jam de pluraj jaroj Francio estas je la pinto de la membrostatistiko. Ĝis decembro 2015 entute 607 (569 2014) francoj membriĝis kaj multaj el ili tre regule, preskaŭ ĉiutage, uzas la retejon. La ranglisto apenaŭ ŝanĝiĝis kompare al la du lastaj jaroj. Kvankam RISKO portis multege da novaj membroj, ili venis proporcie el la samaj landoj, kie ni havis jam multajn membrojn.


Menciindas tamen, ke danke al la KER-ekzamenoj, venis pli da interesiĝantaj membroj el Rusio, Ĉinio kaj ankaŭ el Japanio. (Informcele: listofine Vjetnamio havis 30 membrojn fine de 2015).

Nia ĉeesto ankaŭ en Facebook portis kelkajn novajn membrojn kaj pli aktivan uzon de la retejo. En tiu ĉi jaro ne aperis aŭtomate en facebook novaĵoj pri ĉiu nova movo kaj informo de la paĝaro, la afero ne estis aŭtomata, sed mane redaktita kaj malpli ofta. Ni pli atentis pri tio, ke ni lasu mesaĝojn kaj informojn sur la paĝaro de aliaj asocioj kaj membroj, ekz. ILEI, UEA, DUOLINGO, EuroTalk ktp.

Alia maniero ekkonigi la paĝaron estas la informprelegoj, publikaj kursoj, ĉeestaj RISKO-ludoj, reklamoj.

La redaktoro kaj kelkaj membroj dise en la mondo okazigis tiajn elpaŝojn. Klare montriĝas post tiaj eventoj la kreskanta intereso pri la paĝaro, nome venas pli da vizitoj aŭ novaj membroj el la preleglokoj kaj ties ĉirkaŭaĵoj.

Vidu detalojn de la statistikaĵoj pri la uzantoj: <http://www.edukado.net/prie/sinprezento/statistiko?tipo=uzantoj/>



UZO DE LA EKZERCOJ EN LA SEKCIO INSTRUMATERIALOJ

Estimataj instruistoj,

Ni informas vin pri tio, ke ekde la 4a de oktobro 2015

nur tiuj povos uzi la ekzercojn de la sekcio, kiuj registris kurson en nia KURSEJO, studas en RITE, estas aŭtoro de ekzercoj aŭ finance subtenis la paĝaron.

Kun bedaŭro ni devas fari tiun paŝon, ĉar por pluraj lingvopolitikaj projektoj ni bezonas pravi kiom da Esperanto-kursoj ekzistas en la mondo, do, bezonas statistikaĵojn kaj realan bildon pri la situacio.

Malgraŭ pluraj petoj pri registrado ni ne sukcesis atingi ke oni listigu siajn kursojn, tial ekde nun nia paĝaro helpas nur tiujn kursgvidantojn, kiuj pretas kunlabori kaj helpi nian komunan laboron.

Por ekhavi la rajton je ekzercoj, vi povas registri vian kurson ĉi tie:

<http://edukado.net/kursejo?aldoni=1>

Post la registrado via enskribo estos kontrolata, aprobita kaj maksimume ene de kelkaj horoj vi havos rajton elŝuti ekzercojn.

Se vi bezonas la servojn por aliaj celoj, ekzemple mem lerni la lingvon, bv. aparte kontakti la redaktoron por peti rajtigon.

En okazo, ke vi apartenas al kategorio, kiu devus havi liberan aliron, sed vi ne trovas tion, bv. tuj kontakti min por ke mi povu aldoni vin al la grupo.

Katalin Kováts, redaktoro

En 2015 ni ne vere okupiĝis pri la riĉigo de la instrumaterialoj, pli precize ni kolektis kaj redaktis kelkdekojn el ili, sed tiuj ne estis publikigitaj. La jam aperigitaj 830 materialoj estas sufiĉaj kaj kontentigas la bezonojn de la membroj. Per aperigo de novaj ekzercoj ni ne volis iriti la membrojn, ja en oktobro la sekcio de instrumaterialoj estis fermita por multaj el la uzantoj. Per tiu ago ni decidis stimuli la membrojn je registrado de kursoj en la KURSEJO. La supra verda bloko havas la klarigon, kiu aperis en la paĝaro kaj kiu ne faris la retejon tre populara, sed portis registradon de 100 novaj datumoj pri kursoj.

Ĉi-sube videblas la statistiko pri la elŭtoj de ekzercoj:

Jaroj	Monatoj												Entute
	jan	feb	mar	apr	maj	jun	jul	aŭg	sep	okt	nov	dec	
2015	1317	1726	1581	1025	1427	1797	4577	1428	1347	750	901	686	18562
2014	1725	3244	2323	1781	1090	1637	1594	1211	940	1504	1797	1523	20369
2013	1496	1461	1895	2135	1694	1327	1308	566	1196	1246	1548	1399	17271
2012	2097	1265	1708	1525	1376	1275	1041	726	1221	1665	1579	1362	16840
2011	1938	2270	2653	1362	1913	1275	1475	1394	974	1904	2839	1381	21378
2010	0	0	0	0	0	6	6	56	67	1772	2091	1603	5601


Lando	Nomo	Elŭtoj		Lando	Nomo	Elŭtoj
				CH	MM	692
BR	M.A.	3692	<p>Flanke estas la listo de la plej grandaj uzantoj de la ekzercoj.</p> <p>Kelkaj membroj laŭvorte voras la ekzercojn, re- kaj reelŭtas ilin, longe serĉadas. En si mem tio estas ĝojiga afero, sed ni atendas de ili iom pli da reagoj, esprimon de opinioj pri la materialoj, eventuale kontribuojn, per ekzercoj, komentoj aŭ financoj.</p> <p>Oranĝkoloraj estas tiuj, kiuj iam sendis subtenmonon aŭ labore kontribuis.</p>	FR	P.L.	676
SK	M.F.	2518		AR	A.A.	674
FR	J.S.	1995		FR	G.B.	671
BR	A.	1852		RU	A.O.	654
DE	G.N.	1275		IT	G.G.V.	649
HU	V.G.	1145		LT	GO	647
BR	JFM	1112		IT	L.OM.	646
PL	G.S.	1067		GB	I.C.	624
FR	P.L.V.	1028		FR	C.B.	611
Usono	A.R.	1019		HU	Z.A.	575
PL	P.W.	998		FR	M.C.	572
BR	R.S.	956		HU	P.Zs.	562
BE	C.R.	821		SR	L.A.	548
RU	T.R.	802		SR	V	537
BR	M.D.G.	791		FR	A.P.	536
FR	P	753		BE	N.B.	528
FR	V.	744		BR	J.R.A.A.	525
CN	R	739	AT	U	521	
FR	M	728	Usono	S.T.	509	
FR	M	703	BE	FJP	502	

KAMPANJO POR REGISTRADO DE KURSOJ

En la kursejo entute estas: 90 movadaj kursoj, 28 lernejoj kursoj, 131 kursgvidantoj. (En 2014 estis: 51 movadaj kursoj, 15 lernejoj kursoj, 95 kursgvidantoj.)


En la arkivejo troviĝas pliaj neaktualaj registraĵoj: 476 (390) movadaj kursoj kaj 382 (260) finiĝintaj lernejoj kursoj.

Lernejoj kursoj



Movadaj kursoj

Entute 90 (51) movadaj kursoj el 22 landoj.



Entute: 136 kursgvidantoj el 31 landoj.

III. POPULARAJ EROJ - GRAVAJ AGADKAMPOJ EN 2015

RISKO



La plej populara parto de la retejo estas ankoraŭ la ludo RISKO. Tage ĉ. 120-130 personoj venas, eĉ plurfoje ensalutas en la retejon por ludi aŭ kontroli la rangliston.

Kelkaj fariĝis dependaj de la ludo, tiel ke okaze de teknikaj problemoj niaflanke aŭ ĉe la ludantoj, ekestas plendleteroj. Estas manpleno da ludantoj, kiuj dekomence mistrakis eĉ ne unu tagon aŭ nur maksimume 4-5 je la komenco. Tio signifas, ke preskaŭ de tri jaroj ili ensalutis kaj ludis ĉiun tagon, ĉu en ferioj, ĉu meze de vojaĝoj aŭ festoj. Ni en januaro 2016 festos la 1000an ludotagon ĉe pluraj ludantoj.


Inter la du plej bonaj ludantoj kelkfoje ekestas forta, jam malsana rivalado, kion malfacilas bremsi. Eblos, ke venos nova regulo, kaj en ĉiu jaro ni forigos la plej bonan ludanton.

La du redaktoroj, Katalin Kováts kaj Mogens Rude Andersen regule aldonadas novajn demandojn, sed ili nun sume ne sufiĉas por tio, ke la plej oftaj ludantoj havu ĉiam tutnovajn demandojn. Ankaŭ tio subtenas la ideon post dujara ludo ripozigi la plej oftajn ludintojn.

Jare kelkfoje ni okazigas ĉeestajn ludojn kun premioj, kaj ankaŭ niaj membroj foj-foje petas materialojn por tiaj ludoj.

La ideo, ke ni kreu retan ludon, aboneblan por grupoj, devas iom forŝoviĝi, ja alia projekto (nome Ekparolu!) okupas la fortojn en 2016.

Ludantoj laŭ landoj



El la 65 landoj en la unua pozicio Francio havas 119, en la sube montrata Kolombio havas 8 ludantojn.

Informoj pri la ludo

Jen ligo al la koncerna sekcio: [Risko-ludo](#)

Entute unuopaj ludantoj: 754

Ludoj laŭ monatoj kaj jaroj

Jaroj	Monatoj												Entute
	jan	feb	mar	apr	maj	jun	jul	aŭg	sep	okt	nov	dec	
2015	2448	2100	2344	2375	2349	2141	1937	2079	2445	2432	2368	2377	27395
2014	2352	2284	2344	2236	2167	2132	2226	2112	2164	2169	2289	2499	26974
2013	0	0	0	1550	2767	2415	2109	2189	2249	2490	2495	2426	20690

Ludantoj laŭ monatoj kaj jaroj

Jaroj	Monatoj												Entute
	jan	feb	mar	apr	maj	jun	jul	aŭg	sep	okt	nov	dec	
2015	136	118	140	163	139	126	121	121	150	130	130	132	1606
2014	149	138	125	153	142	127	131	122	137	133	147	160	1664
2013	0	0	0	290	216	168	149	145	150	149	161	154	1582

Demandokvantoj laŭ monatoj kaj jaroj

Jaroj	Monatoj												Entute
	jan	feb	mar	apr	maj	jun	jul	aŭg	sep	okt	nov	dec	
2015	6366	5488	6147	6221	6081	5596	5022	5408	6349	6363	6216	6184	71441
2014	6112	5854	5988	5774	5680	5515	5814	5452	5579	5557	5875	6373	69573
2013	0	0	0	3929	7031	6194	5462	5789	5901	6540	6545	6293	53684

KER-EKZAMENOJ

Edukado.net daŭre aktive kunlaboras kun UEA, sekve fariĝis la centro de la organizado de la monda ekzamenado pri Esperanto laŭ la Referenckadra sistemo (Common European Framework of Reference). Nia ekzamen-sekcio liveras la bazajn informojn, specimenojn, kolektas aliĝojn kaj informas pri statistikoj kaj ekzamen-kalendaro. Vidu ĉe: <http://edukado.net/ekzamenoj/ker/>

2015 estis laŭkalendaro la oka ekzamenjaro, sed fakte kiel plena jaro nur la sepa.
En 2015 okazis entute 4 memstaraj ekzamensesioj kaj unu tutmonda sesio kun 13 ekzamenlokoj.

1.	Rio-de-Janeiro - Brazilo
2.	Greziljono Francio, Managvo – Nikaragvo La Chaŭ-de-Fonds – Svislando
3.	Tutmonda sesio en 13 lokoj Francio: (4) en Parizo, Limoĝo, Tuluzo kaj en Lannion Brazilo : (2) Kuritibo kaj Maceio Japanio: (2): Osako kaj Tokio Kolombio: Bogoto Koreio: Seulo Nederlando: Hago Serbio: Subotica
4.	Lillo- Francio

Statistikajo laŭ la kandidata nombro en la diversaj ekzamenlokoj														
	Urbo	Lando	B1S	B1P	B1K	B2S	B2P	B2K	C1S	C1P	C1K	Sume	Poentoj	
1	Parizo	Francio	1	0	0	8	0	0	3	0	0	12	26	
2	Toulouse	Francio	0	0	3	1	1	3	0	3	1	12	37	
3	Bauge en Anjou	Francio	0	0	1	0	2	6	0	1	1	11	39	
4	Seulo	Koreio	3	0	0	7	0	0	0	0	0	10	17	
5	Subotica	Serbio	2	0	3	0	0	2	2	1	0	10	25	
6	Lannion	Francio	9	0	0	0	0	0	0	0	0	9	9	
7	La Chau-de-Fonds	Svislando	3	0	0	2	0	1	1	0	0	7	14	
8	Limoĝo	Francio	1	0	3	0	0	3	0	0	0	7	19	
9	Managvo	Nikaragvo	5	0	0	1	0	0	1	0	0	7	10	
10	Osako	Japanio	4	0	0	3	0	0	0	0	0	7	10	
11	Maceio	Brazilo	2	0	0	1	0	0	3	0	0	6	13	
12	Kuritibo	Brazilo	0	0	0	0	1	1	3	0	0	5	15	
13	MOSKVO	Rusio	4	0	0	0	0	0	1	0	0	5	7	
14	Tokio	Japanio	0	0	0	3	0	0	2	0	0	5	12	
15	Den Haag (Hago)	Nederlando	1	0	0	1	0	0	1	0	0	3	6	
Sume												116	259	


En la tuta jaro en 17 urboj de 9 landoj estis ebla trapasi KER-ekzamenojn. Sume ekzameniĝis 177 personoj.

Ĝis la fino de 2015 entute 1678 sukcesaj ekzameniĝoj okazis. La kandidatoj devenas el 66 landoj.

La nomojn de la ekzamenitoj vi povas legi en nia FIERLISTO

<http://edukado.net/ekzamenoj/kandidatoj>

El inter ili la suba grafikaĵo indikas la 22 plej sukcesajn landojn kaj la nombron de la tieaj kandidatoj.




Kandidatoj laŭ jaroj, landoj, poentoj kaj personoj (1687 kandidatoj el 66 landoj.)

Jaro: 2015 ▾ Ordigi laŭ: personoj ▾											
	B1			B2			C1				
	S	P	K	S	P	K	S	P	K	Poentoj*	Personoj
1. Francujo	10	3	8	10	5	14	5	4	6	178	65
2. Brazilo	8	0	0	8	1	1	10	0	0	60	28
3. Japanujo	4	0	0	6	0	0	2	1	0	25	13
4. Sud-Koreujo	2	0	1	7	0	0	0	1	0	21	11
5. Svislando	3	0	0	2	0	1	1	0	0	14	7
6. Rusujo	3	0	0	0	0	0	2	1	0	10	6
7. Serbujo	2	0	0	0	0	1	2	1	0	15	6
8. Hispanujo	1	0	0	0	0	3	0	0	0	13	4
9. Nederlando	1	0	0	0	0	0	1	2	0	10	4
10. Nikaragvo	2	0	0	1	0	0	1	0	0	7	4
11. Germanujo	0	0	0	0	0	0	1	0	2	15	3
12. Usono	0	0	0	0	0	0	1	0	2	15	3
13. Ĉinujo	0	0	1	0	0	0	0	0	2	14	3
14. Slovenujo	0	0	3	0	0	0	0	0	0	6	3
15. Belgujo	0	0	0	0	0	0	0	0	2	12	2
16. Kubo	0	0	0	0	0	0	0	0	2	12	2
17. Meksiko	0	0	0	0	0	0	0	2	0	6	2
18. Norvegujo	0	1	0	0	0	0	0	0	0	1	1
19. Indonezio	0	0	0	0	0	1	0	0	0	4	1
20. Orienta Timoro	0	1	0	0	0	0	0	0	0	1	1
21. Finnlando	0	0	0	0	0	0	0	1	0	3	1
22. Pollando	0	0	0	0	0	0	1	0	0	3	1
23. Svedujo	0	0	0	0	0	0	0	1	0	3	1
24. Kolombio	0	0	1	0	0	0	0	0	0	2	1
25. Bulgarujo	0	0	0	1	0	0	0	0	0	2	1
26. Hungarujo	0	0	0	0	0	0	0	1	0	3	1
27. Rumanujo	0	0	0	0	0	0	0	0	1	6	1
28. Aŭstrujo	0	0	0	0	0	1	0	0	0	4	1
Entute	36	5	14	35	6	22	27	15	17		
	55			63			59			465	177

*Poentkalkulado: C1K valoras 6 poentojn, B2K-ekzameno 4, B1K 2 poentojn.


La skriba aŭ parola aparte valoras la duonon de la koncerna nivelo.



Bedaŭrinde la nombro de la ekzamenitoj de jaro al jaro falas. Estas malfacile akcepti, ke malgraŭ la daŭraj reklamoj, alvokoj kaj varbado ni apenaŭ trovas pliajn novajn ekzamenlokojn kaj kandidatojn.

Por iom pli popularigi la ekzamenojn Katalin Kováts en 2015 kunmetis 8-panelan grandan resummaterialon pri la historio kaj rezultoj de la ekzamenoj kaj prezentis la ekspozicion dum la jubilea kongreso en Lillo.

La ekspozicion vidis kaj ŝatis multaj kongresanoj. La pozitivan efikon de la informado espereble ni vidos en 2016, kiam denove okazos tutmonda ekzamentago kaj aliaj sesioj.



La 13an de julio 2015, en AppStore aperis nova lingvokurso de Esperanto. Ĝi estas produkto de la brita entrepreno **EuroTalk**, kiu kunlabore kun edukado.net pretigis Esperanto-version de sia kurso por la modernaj aplikaĵoj kiel saĝtelefonoj (iPhone) kaj tabulkomputiloj (iPad).

Nian lingvon vidas en la elektolisto miliono da uzantoj de la programo, kaj la internacia lingvo estas lernebla elire el 128 lingvoj.

Tiu nombro ĝis la fino de 2016 kreskos ĝis 200.



En la traduklaboro de la Esperanto-versio kunlaboris Katalin Kováts, Malcolm Jones kaj Petra Smidéliusz. En la sonregistrado laboris Sylvain Lelarge kaj Katalin Kováts.

La aperon de tiu programo ni opinias grava, kvankam la eksterordinara sukceso de DUOLINGO absolute malgrandigis la efikon de tiu nia laboro. Tamen menciendas, ke la kurson de DUOLINGO eblas uzi nur el la angla lingvo, dum la kurson de uTalk sekveblas el pli ol 100 lingvoj. La faktoj, ke tiu lasta uzeblas nur pere de specialaj teknikaĵoj kaj ili estas pagendaj, ne faris ĝin sufiĉe populara. Kiel ajn, vere valoras prezenti ĝin al la lernantoj de Esperanto, ĉar la moderna kaj motiviga maniero lerni novajn vortojn estas efika rimedo. La apero de Esperanto inter la lingvoj de la mondkonata entrepreno estas ankaŭ bona propagandilo por la internacia lingvo, kio en si mem jam estas granda rezulto.

Ni fieras, ke la entrepreno ŝatis nian kunlaboron, kaj okaze de la jubilea kongreso dum 10 tagoj senpage disponigis la unuajn du kursŝtupojn pri kio ni provis vaste informi la esperantistaron en julio.

Pri la lingvolernilo de EuroTalk, kunlaboro kun edukado.net kaj pri la produktado de la kurso vi povas spekti filmon en nia [Filmejo](http://edukado.net/biblioteko/filmejo?iid=294).

Kaj nun la gravaj ligoj: www.uTalk.com, elŝuteblo de la programo ĉe [AppStore](#) kaj [iTunes](#)

Atentu, ĉar estas de la sama entrepreno aliaj Esperanto-kursoj, serĉu la produktojn por telefonoj kaj tabulkomputiloj, markitaj per tiu apuda blua logotipo.



GRUNDTVIG-PROJEKTO



Nia paĝaro partoprenis en la eŭropa Grundtvig-projekto 'Kultura diverseco kaj multlingvismo de Eŭropo - kiel lerni pri ili?'

La subvencio de la Eŭropa Unio ricevis 4 organizaĵoj: Centro de Interkultura Edukado (CEM) (Pollando – Nowy Sącz), edukado.net (Nederlando-Hago), Filio de Germana Esperanto-Asocio por Klerigado kaj Kulturo (Germanio-Herzberg am Harz) kaj Kultura Esperanto-Asocio (KEA) (Hungario-Budapeŝto). En la tempoperiodo inter 2013 kaj 2015 necesis reciproka partopreno en la programaranĝoj unu de la aliaj kaj produktado de kulturaj valoraĵoj en la projektotemo.

Niaj partneroj estis la frislandaj Esperanto-muzikgrupoj Kajto kaj Kapriol', kiuj kaj partoprenis aranĝojn kaj aktive kunlaboris en la organizado de la nederlanda – fakte frislanda – programo. Rekompence el la projektomono edukado.net subvenciis kelkajn kulturajn programojn de la muzikgrupoj kaj la eldonadon de nova disko de Kapriol'.

Nia kultura produkto estas pluse la reta kurso pri Frislando kaj ĝia kulturo, kiun ni publikigis kun la propraj kulturkursoj de la partneraj landoj en la sekcio LIBERAJ STUDOJ.

Kvankam la tuta projekto estis iom ekster nia profilo, ni eluzis la okazojn por internaciaj renkontiĝoj, fortigo de kunlaboroj, kaj ĉar por la produktaĵoj necesis teknikaj modernigoj de la ekipaĵo de la fondaĵo, el la subvencimono edukado.net sukcesis akiri kelkajn novajn teknikaĵojn. Ankaŭ la malmultan, tamen restintan monon ni uzos por oficejaj instalaĵoj, modernigo de la komputila reto, prizorgado de la sekursavaĵoj, propra printilo kaj aliaj programoj. <http://edukado.net/grundtvig>



POZNAN: INTERLINGVISTIKAJ STUDOJ



Edukado.net estas en laborkontakto kun la Interlingvistikaj Studoj en Poznan.

Katalin Kováts jam de ĉ. 10 jaroj partoprenas en la tiea laboro, gvidas la metodikan preparon de la studentoj, en ĉiu tria jaro de la studoj. La retejo jam de pluraj jaroj donas spacon en la KLERIGEJO, kie la studentoj de IS povas sekvi siajn studojn kaj inter la konsultiĝoj povas labori.

ESF⁶ (kunlabore kun UEA krome komisiis Katalin gvidi la komisionon, kiu respondecis pri la aljuĝoj kaj disdonado de la studstipendioj de ESF. Edukado.net ankaŭ en si mem lanĉis kolektadon de subvencioj por subteni la kursanojn en siaj vojaĝ- kaj restadkostoj. Danke al tiu kampanjo kaj helpo de la membroj de edukado.net pluraj studentoj havis helpon. Tiun laboron K. Kováts daŭrigis ankaŭ en 2015, fakte ĝis la fino de la studoj de la nuna grupo. La studentoj kaj profesoroj daŭre povos uzi por la laboro ankaŭ la speciale kreitan IS-spacon en la KLERIGEJO. <http://www.edukado.net/helpu/poznan>.



En la tria jaro de la studoj la studentoj havos eblon elekti ankaŭ metodikan formadon, kaj kune kun ili ekde septembro 2016 al

la metodikaj studoj povos aliĝi ankaŭ tiuj, kiuj volas nur **unuĵaran instruistan trejnadon** en Poznan, sub la gvido de Katalin Kováts. Anoncon pri tio eblas legi en la novaĵoj: <http://edukado.net/novajhoj?id=593>.

Ni esperas, ke multaj aliĝos kaj partoprenos en la laboro ankaŭ RITE-kursanoj.

MEMORLIBRO DE MILA VAN DER HORST-KOLINSKA

Nia delonga sponsoro, Mila van der Hors-Kolinska, komisiis al edukado.net la manuskripton de sia biografio kun la peto, ke ni redaktu ĝin kaj enpaĝigu por estonta reta publikigo kaj produktado de paperforma libro en limigita kvanto. Por tiu celo Mila donacis al edukado.net sumon, kies parton ni elspezis por pagita provlegado, redaktora kaj enpaĝiga laboro, kiun faris Leandro Tome Abrahão. La reston de la mono ni povos konservi.

Ni esperas, ke niaj membroj helpo en la fina provlegado kaj komentado, kiun ni aranĝos antaŭ la presigo de la libro en pli granda kvanto kaj publikigo de la cifereca versio. La libro estas finredaktita. La 30an de januaro 2016 la unua kaj sola presita ekzemplero estis enmanigata al la jam tre malsana aŭtorino.



ĈEESTAJ KURSOJ KAJ LABORO DUM UK

La agado de edukado.net disvolviĝas ĉefe en la reto, sed jare plurfoje okazas ke la redaktoro gvidas kursojn kaj trejnadojn en Esperanto-aranĝoj. La plej granda tia elpaŝo estas jam de 14 jaroj la kutimaj programoj: "Paroligaj kursoj" dum la universalaj kongresoj. Katalin Kováts kaj ŝia edzo Sylvain Lelarge okazigas tre popularajn lingvokursojn dumkongrese. La dumlecionaj aktivaĵoj baziĝas sur la ekzercoj kaj materialoj de la paĝaro, kaj tiel la aranĝo estas bona okazo ne nur por lerni novajn esprimojn kaj akiri novajn spertojn, sed ankaŭ por instruistoj kaj klubgvidantoj partopreni aŭ almenaŭ observi la lecionojn. La kursoj okazas en du grupoj.

Por komencantoj estas dum 4 tagoj 8 sinsekvaj lecionoj. Tiuj, kiuj partoprenas ĉiun lecionon fine ricevas atestilon. **Por mezniveluloj**, la alia kurso, por kies partopreno necesas minimume A2-lingvonivelo, estas 4 diversaj renkontiĝoj. La du lecionoj de la sama tago pli-malpli identas, do, sufiĉas partopreni nur unu el ili. En Lillo tiuj kursoj estis speciale tre popularaj. En ambaŭ niveloj la salonoj estis plenplenaj. Ĉe la komencantoj dekoj sidis regule sur la planko, pro manko de sufiĉaj sidlokoj.

Sylvain gvidis ne nur Esperanto-kursojn, sed estante franco, ankaŭ pri la franca okazigis paroligajn kursojn je progresanta nivelo, kaj metodike helpis la instruiston de la porkomencanta franca kurso.



Dumkongrese Katalin mem partoprenis ankaŭ en la programoj de la Akademio, kaj prelegis pri uTalk dum la tago de la lernejo, aranĝo de ILEI.

Pretigo de la KER-ekspozicio, ilia instalado, organizado de la KER-ekzamenoj, aligo kaj informado de la personoj, surloke reĝisorado de la skribaj, laboratoriaj kaj parolaj sesioj, presado de la dokumentoj kaj testoj per propra, kunportita printilo okupis dudekon da horoj en Lillo. La efektivigon de ĉiuj taskoj ĉi-jare multe malhelpis la nesufiĉa apogo de UEA, la manko de ejoj kaj informoj. La eksterkongreseja kaj fora ekzamenloko, kiun Katalin kun la kolegoj mem devis aranĝi portante seĝojn kaj tablojn tra ŝtuparoj, la neglata informado de la kandidatoj prenis

multege da energio kaj igis Katalin turni sin al UEA kaj peti, ke en kontrakto estu difinitaj la taskoj kaj kondiĉoj, por ke tiaj misgлатаĵoj ne plu okazu dum la kongresoj. Espereble, ekde Nitro, la KER-ekzamenoj havos propran budon/oficejon/giĉeton kaj ĉiuj interesiĝantoj povos akiri la necesajn informojn pri la ekzamenoj de UEA, kiujn organizas edukado.net/Katalin Kováts.

Pro pluraj publikaj elpaŝoj la redaktoro ĉi tie volas konfirmi, ke por la dumkongresa agado de edukado.net nek Katalin Kováts nek Sylvain Lelarge ricevas honorarion. Ilia faciligo estas flanke de UEA, ke ili sen aliĝkotiĝo rajtas partopreni la kongreson, kaj ili kune ricevas de UEA en sumo de maksimume 500 eŭroj kontribuon al la loĝkostoj.



Ili kaj nun, dum la jubilea UK, kaj neniam antaŭe estis publike dankataj fine de la kongreso, kiam la volontuloj kutime povas surscenejiĝi.

Tiu manko de atento flanke de UEA ĉi-jare estis speciale malmotiviga. La filo de la paro ĉeestis la kongreson, helpis dum la aranĝoj kaj estintus bona okazo, ke li povu fieri pri siaj gepatroj. Dum la ferma ceremonio, li konsternite demandis al la patrino, kial ili ne estas listigitaj sur la ekrano. Manke de akceptebla respondo, Katalin tiam forlasis la ferman ceremonion.

Dankon al Mónica Molnár, kiu postkongrese enretigis en Facebook iun konsolfoton. Bonvolu ne miskompreni, tiu bildo neniam vidiĝis sursceneje en Lillo.

Dankon al Margaretha Symoens kaj aliaj, kiuj en mesaĝoj al UEA kaj al Katalin esprimis sian malkontenton kaj bedaŭron.



LA EŬROPA TAGO DE LINGVOJ



La *Eŭropa Centro de Modernaj Lingvoj* (filio de la Konsilio de Eŭropo) akceptis plian dokumenton de ni, kaj sendis al nia redaktoro la enpaĝigitan Esperanto-version de la ĉi-jara kampanjo-broŝuro, kies tekston antaŭ kelkaj semajnoj edukado.net sendis al ili. Ĝi aperis inter la aliaj lingvoj, dekstre, sube, sur ilia ĉefpaĝo <http://edl.ecml.at/>.

Ni esperas, ke baldaŭ ni povos paŝi pli antaŭen, ĉar ankaŭ aliaj tradukoj estis senditaj por ke ilia paĝaro pli kaj pli "verdiĝu". La nuna sukceso estas rezulto de plurjara laboro kaj lingvopolitika agado. Sed certe multe helpis, ke pli ol 30 Esperanto-aranĝoj estis registritaj en la pasintaj tagoj en la [Evento-kalendaro de la paĝaro](#), kaj dekoj da personoj plenigis la [memtaksilon pri siaj Esperanto-konoj](#), kiel tion ni petis. (Legu pri tio en la novaĵo: <http://edukado.net/novajhoj?id=571>).

SKAJPA LINGVOFESTIVALO



Kun sukceso okazis la 26an kaj la 28an de septembro sep skajpaj prelegoj pri lingvoj, organizataj de Katalin Kováts, www.edukado.net. La lecionojn pri la itala, franca, ĉina, vjetnama, islanda, rumantsch grischun kaj okcitana lingvoj

partoprenis entute 35 personoj, multaj ankaŭ plurajn sesiojn.



Renato, italo el GB



Sylvain, franco el NL



Neĝeta, ĉinino



Thu, vjetnamo



Nicola, italo el IS



Mireille Grosjean



Kristof, franco

Niaj prelegantoj, Renato Corsetti, Sylvain Lelarge, Xuequin Shi (Neĝeta), Nguyen Xuan Thu, Nicola Ruggiero, Mireille Grosjean kaj Christophe Chazarein preparis kaj gvidis siajn programojn tre bone. Ni, la kursanoj, lernis pri ĉiu lingvo interesajn aferojn.

Ligo al la raporto: <http://edukado.net/novajhoj?id=572>

Danke al nia alvoko, pli ol 30 kluboj kaj lokoj registris Esperanto-programon sur la paĝaro de la organizantoj.

IV. PLANOJ POR LA JARO 2016

KELKAJ SOLVENDAJ STRATEGIAJ PUNKTOJ

Por sekurigi la kontinuan funkciadon de la retejo kaj ties riĉigon, ni bezonas akiri fiksjajn kaj regulajn sumojn en formo de subteno. La hazardaj donacoj ne estas kalkuleblaj kaj ne ebligas prizorgadon, modernigon de la retejo kaj planadon kaj efektivigon de novaj eroj.

Jam por 2015 ni celis ke inter la membroj de la paĝaro ni trovu fiksjajn kaj regulajn sponsorojn, kiuj promesas jare kunmeti minimume 6000 eŭrojn; ili estu almenaŭ 50-ope. Ni havis en 2015 de 10 personojn en valoro de 4000 eŭroj fiksan sumon. Tio estas malpli ol ni esperis, sed ni donas unu plian jaron por atingi niajn malnovajn celojn. Sekve, se ĝis la fino de 2016, ni ne sukcesos atingi la nombron de subtenantoj kaj la sumon, estonte ni devos enkonduki membrototizon kaj fari pagendaj kelkajn el la servoj.

Krom ĉi tiu grava paŝo ni devas plu agadi sur la sekvaj kampoj:

TREJNADO – LINGVOKURSOJ

- Ni lanĉos la novan grandan projekton Ekparolu!, kadre de kiu ni volas organizi mondscale, pere de la modernaj teknikaĵoj, reton de Geonkloj (spertuloj) kaj Genevoj (komencintoj), kun la celo, ke tiuj lastaj havu paroleblon. La geonklojn ni ne nur varbas kaj kontaktigos kun la lernemuloj, sed ni trejnos ilin kaj kreos, disponigos por ili helpmaterialojn. La varbado komenciĝos jam en januaro 2016.
- Dum UK en Nitro, edukado.net okazigos denove paroligajn kursojn, KER-ekzamenon kaj partoprenos per kontribuo al la programo de la Tago de Lernejo.
- Poznan: edukado.net daŭrigos la kampanjon por trovi subvencimonojn por la kursanoj de Poznan kaj ene de la sistemo de RITE donos kaj prizorgos spacon por la kursanoj.
- Katalin Kováts, redaktoro, gvidas metodikan seminarion en la tria jaro de la Interlingvistikaj Studoj, en Poznan, kiun oni kompletigas per unujara metodika kurso, al kiu necesas varbi eksterajn studentojn.
- Katalin Kováts partoprenos kaj gvidos metodikan seminarion dum la Itala Kongreso, en aŭgusto.
- Edukado.net, jam tradicie, gvidos kursojn dum la Eŭropa Rendevuo en Le Touquet, Francio.
- Ni komplete finos la enhavon de la RITE-kursaro kaj pli efike varbos por ke oni partoprenu tiun kurson. Ties taskojn kaj produktojn ni enirigos en la paĝaron.

RISKO

- Plua kolektado de demandoj por la RISKO-ludo pere de lingvaj kaj kulturhistoriaj demandoj, en kio donas al la redaktoro netakseble grandan helpon Mogens Rude Andersen el Danio. Ni dankemas!
- Prelegoj kaj ĉeestaj RISKO-ludoj en grandaj aranĝoj. Disponigo de pretaj ludmaterialoj ankaŭ por lokaj grupoj, momente nur en pretaj, projekcieblaj versioj, kune kun uzkonsiloj, eble post unu jaro ankaŭ rete.
- Enkonduko de novaj reguloj kun la celo iom post iom paŭzigi la plej oftajn ludantojn.

KER-EKZAMENOJ

- En 2016 la 5a Tutmonda Ekzamentago disfalos en du partojn. La unua turno de la sesio estos en aprilo, la dua en junio. La lokoj povas elekti la por si pli taŭgan daton de la ekzamenoj. Menciendas, ke pro la nuntempe malkreskanta ekzamenigemo, eblas ke en 2017 ni faros paŭzon kaj ne okazigos tutmondan sesion. Por la ekzamenoj restos nur apartaj sesioj, okazigotaj kadre de grandaj aranĝoj.

KONTAKTOJ, KUNLABOROJ

- Edukado.net daŭre kunlaboros kun UEA, ĉefe por la KER-ekzamenoj, dumkongresaj kursoj kaj eventualaj taskoj surkampe de instruado kaj trejnado de instruistoj.
- Okazos plua kunlaboro kun ILEI, en iliaj aranĝoj kaj en la revuo IPR.
- Eblas porokazaj komunaj aranĝoj kaj helpoj inter TEJO kaj landaj asocioj, regionaj kaj lokaj kluboj, depende de la bezonoj kaj disponeblo de la redaktoro de edukado.net.

KURSEJO

Ni daŭrigos la fortan stimulan de la kolegoj je registrado de kursoj. Ankaŭ en 2016 la sekcio Instrumaterialoj restos fermita por tiuj, kiuj ne registras siajn kursojn kaj agadojn. En 2015 estis plibonigo de la kursa registrado, precipe en la kampo de la instrumaterialoj. En 2016 necesas ordigi kaj pli bone analizi la instrumaterialojn, kiujn la raportitaj grupoj uzas. La programo, kiu faciligas la kolektadon kaj prezentadon de tiuj informoj, pretas. En 2016 necesas ankoraŭ ordigi la raportitajn datumojn. En tiu ĉi jaro necesas konstrui ankaŭ la retrostatistikan funkcion, delonge planitan.

CETERO

Daŭre restas kiel plano la subaj du punktoj, por kies realigo ne restis tempo kaj forto en la pasintaj jaroj.

- kontroligo de la ekzercoj fare de la sekcio Lerniloj de la Akademio de Esperanto
- reta lingvotestilo – ties efektivigo dependas de la programista kapacito

EKPAROLU!

Nia plej grava projekto por la jaro 2016 estas la tielnomata Ekparolu!

Celo de la projekto:

- Doni eblon al la ĵuslernintoj de Esperanto parole apliki la lingvon, ensociiĝi kaj informi ilin pri la programoj, kursoj kaj pluaj ebloj de studoj,
- Vaste eluzi la liberajn fortojn de la movadanoj partopreni en la plua edukado de komencintoj,
- Fortigi la lokajn klubojn kaj la movadon.

Baza ideo

Ene de edukado.net ni kreas surfacon, kie la du flankoj, nome NEVOJ – (komencintoj) kaj ONKLOJ (speciale trejnitaj esperantistoj) trovas unuj la aliajn kaj helpe de skajpa kontaktiĝo pasigas kune parolosesiojn. (Kompreneble sub la nomo ONKLOJ kaj NEVOJ ni komprenas ankaŭ onklojn kaj nevinojn.) Ni nombros la sesiojn ambaŭflanke.

La NEVOJ devus anonci sian intencon uzi la servon. Ni akceptos tiujn, kiuj estas je A2-nivelo, aŭ finis la arbon de DUOLINGO, konas la bazon de la gramatiko kaj konas minimume 300 vortojn. Enirinte la programon ili ricevos rajton je 20 (aŭ 30) sesioj de 20 minutoj (decidota) por ekzerci sin en la parolata lingvo.

Ili povos elekti pri kio ili volas ekzerci sin: prononcadon, paroladon laŭ difinitaj temoj, aŭ liberan konversacion, ekzerci sin pri konkretaj gramatikaĵoj aŭ korektigi kelkfoje skribaĵojn.

La ONKLOJ estos spertaj esperantistoj, sed ne nepre instruistoj. Ilia tasko estos la paroligo de komencintoj.

La onkloj havu minimume B2-nivelon (prefere kun KER-atestilo). Ili ricevos formadon pri uzo de retprogramoj, ekzemple skajpo.

Edukado.net disponigos mallongan manlibron pri la strukturo kaj ĉefaj reguloj de sukcesa paroliga sesio kaj, por ĉiu temo, kiun la nevoj povos elekti, ni donos unupaĝan resumon, helpon al la onklo.


La onkloj faros sian agadon senpage, sed la plej aktivaj ricevos premiojn.

Kiam NEVO eniras la reton, li tuj povas lanĉi serĉadon pri paroligeblo, laŭ temo, tempo aŭ serĉi konkretan onklon, aŭ alian laŭ la nacia lingvo, en kiu li volas esti helpata.

Kion ni esperas, kion eblus atingi?

La programo ebligus al ordinaraĵoj esperantistoj, ankaŭ por nevojaĝemaj aŭ malhelpataj finance aŭ fizike en movoj, ke ili partoprenu en la movado, sentu sin utilaj. Ni havas multajn neuzitajn fortojn, kiujn ni povas tiel aktivigi.

Nia plano estas jam en februaro trovi programiston, varbi onklojn, komenci ilian trejnadon kaj ekde marto ellabori la metodikajn helpilojn. La redaktoro devos pretigi la detalan programplanon kaj trakti kun la programistoj. Ni esperas, ke paralele la programistoj povos eklabori, tiel ke plej malfrue en junio ni povu lanĉi la unuajn provsesiojn.



PROGRAMISTA LABORO KAJ KOSTOJ

Danke al la nova kontrakto kun GAUS pri la nova gastejo de la servilo kaj la ĝisdatigo de la retejo, en 2015 ni apenaŭ havis paneon en la retservo. Kvankam la nova aranĝo kostas jare ĉ. 650-eŭrojn, ni renovigis la kontrakton ankaŭ por 2016.

2015 estis ĝis nun la sola jaro, kiam ni ne mendis grandan programistan laboron.

Okazis kelkaj korektoj, plibonigoj, ekzemple en la agendo, statistikaĵoj kaj en la listo de la ludantoj ĉe RISKO, ruĝa kraĵono; aldoniĝis nova naskiĝdata saluto.

En decembro 2015 komenciĝis modifoj en la KURSEJO, sed tiuj finiĝis kaj pagiĝis nur en januaro 2016.

Kaj monon kaj laborforton ni ŝparis en 2015 por la sekvajara granda projekto: Ekparolu!

DANKON AL LA KUNLABORANTOJ

*La redaktoro de edukado.net kore dankas ĉiujn, kiuj per informoj, materialaj kaj financaj kontribuoj helpis la laboron, per informado kaj varbado diskonigis la servojn de la paĝaro aŭ dum UK asistis en al kursoj kaj ekzamenoj. Aparta danko iru al **Leandro Tome Abrahão** (Brazilo) pro la tutjara konstanta helpo en forumoj, korektado, enpaĝigo, al **Mogens Rude Andersen** (Danio) pro la helpo en RISKO, al **Robert Bogenschneider** (Finlando) kaj **Víctor Solé** (Katalunio) kaj **Mónika Molnár** (Svislando) pro la diligenta korektado per la ruĝa kraĵono.*

V. FINANCOJ

La monrimedoj, kiujn la Fondaĵo mastrumas, normale devenas de la sponsoroj kaj donacintoj en formo de donacoj. Krom la banka interezo - kiu estas sensignifa sumo - la Fondaĵo ĝenerale ne havas alian enspezon, pro tio ricevis de la nederlandaj instancoj la statuson de ne-profitcela, bonvola organizaĵo, danke al kio ni ne bezonas pagi impostojn.

En 2015, al la konto de la fondaĵo enfluis ankaŭ aliaj montipoj, pri kiuj pretiĝis aparta administrado.

- *Ni kolektis monhelpon por la studentoj en Poznan. La evenintajn kaj elpagitajn sumojn ni devas listigi en nia financa kalkulo, sed mencias kaj manaĝas ilin aparte. Tiun monfluan eblas sekvi en la publika paĝo de la retejo: <http://edukado.net/helpu/poznan/>*
- *En 2014 Ni ricevis celorientitan donacon por subteni la KER-kandidatojn. Tiujn sumojn ni enfluigis al nia buĝeto, sed atentis ne elspezi pli da mono por la destincelo ol kiom da mono ni ricevis donace. En 2015 ni nur elspezis el tiu sumo, sed ĝi ne kreskis per donacoj.*
- *Celorientita donaco de Mila van der Horst Kolinska venis en 2014, en la valoro de 2600 eŭroj. El tiu sumo ni devis financi en 2015 redaktajn laborojn kaj komence de 2016 aperigi ŝian biografian libron kaj en kelkdeko da presitaj ekzempleroj, kaj diĝitale.*
- *La mono de la Grundtvig-projekto estas granda sumo, sed ties elspezoj estas preskaŭ devigaj, laŭ la projektoplano kaj buĝeto. Ni devis enfluigi tiujn sumojn en la fondaĵan konton. Ne granda, tamen valora profito de la fondaĵo estis la bankaj interezoj, danke al la alta sumo, konservita en la reteja konto; la teknikaj aparatoj, kiujn ni devis aĉeti por la projekto, kaj povos poste uzi por la celoj de la fondaĵo. La reston de la mono edukado.net uzos por oficejoj kaj aliaj teknikaj ekipaĵoj. Nia alia, fakte la ĉefa monfonto estas la ricevitaj donacoj, kiujn la Fondaĵo elspezas por la sekvaj tipoj de agadoj:*
 - *Servilkostoj: ekde 2016 jare ĉ. 650 eŭroj, por kiu sumo ni serĉas regulan sponsoron,*
 - *efektivigo de novaj servoj, prizorgado kaj aktualigo de la jam ekzistantaj retejaj funkcioj,*
 - *programista laboro,*
 - *bankokostoj (Rabobank kaj PayPal),*
 - *poŝtokostoj,*
 - *membrokotizo ĉe ANBI (por la administrado de nia statuso de senprofita, bonvola organizaĵo, kiu ne bezonas pagi imposton en Nederlando),*
 - *pago de PRO-konto ĉe Ipernity, kio ebligas deponi tie filmojn kaj sondosierojn, uzitajn en niaj programoj,*
 - *aĉeto de libroj por la Katalogo,*
 - *kelkaj veturoj de la redaktoro por partopreni aranĝojn, kie la retejo prezentiĝas oficiale aŭ kie ŝi kontribuas sen esti financata de la organizantoj de la aranĝo. Tiuj veturkostoj celas ĉefe enlandajn kostojn (Hago-Roterdamo). Normale la vojaĝkostojn al lokoj, kie la redaktoro prelegas aŭ kontribuas ni povas kaj sukcesas pagigi de la invitintoj. **Vojaĝojn al UK neniam ni pagis al la teamanoj el la fondaĵa mono.** Por tiuj aŭ ESF donis subvencion, kiam la kongreso okazis en Azio aŭ sud-Ameriko, aŭ la redaktoro private pagis sian vojaĝon.*

ENSPEZOJ EN 2015

Por konservi la statuson de ne-profitcela fondaĵo, la subvencimonon, kiun ESF disponigas por la funkciigo de la retejo kaj redaktora honorario, ni ne enirigas en la buĝeton de la Fondaĵo, sed pri tio ni havas apartan kalkulon inter E-duKati kaj ESF.

En la jaro 2015 la sumo, kiun la Fondaĵo ricevis pere de la **84 fojaj donacoj de 48 diversaj personoj estis** 11889,19 **eŭroj** (en 2014 estis 3704,91 eŭroj). El tiu sumo ni devas elpreni 2300 eŭrojn, kiujn ni ricevis por speciala celo, por la subteno de la studentoj en Poznan.

La jare unufoja kampanjo kolekti donacojn en 2015 enhavis konkretajn celojn, por kiuj ni deziris ricevi subtenmonon: <http://edukado.net/prie/datreveno/2015/>. La plimulto de la donacintoj proponis sian kontribuon, elspezotan por la projekto Onkloj (kies nomo intertempe ŝanĝiĝis je EKPAROLU!)

Kvankam la kolektita mono estis bela sumo, bedaŭrinde nur 30 personoj sendis donacon. Entute kuniĝis en tiu donacperiodo (en decembro kaj januaro) 4450,28 eŭroj. Dankon al ĉiuj, kiuj helpis.

<http://edukado.net/prie/datreveno/2015/donacoj>. La tombolojn gajnis: Ingebjørg Rambjør el Norvegio, Synnöve Mynttinen kaj Sylvia Hämäläinen el Finnlando, Paulo Sergio Viana el Brazil, Bert de Wit el Nederlando kaj Mogens Rude Andersen el Danio. Jen la koncerna anonco <http://edukado.net/novajhoj?id=605>

Analizante la donackutimojn, ni povas konstati, ke el inter la donacintoj estas 2 (unu individuo kaj unu asocio, ambaŭ el Belgio) kiuj regule sendas monatan kontribuon. 4 personoj estas, kiuj jare plurfoje kaj regule helpas kaj estas 4, kiuj jarfine en pluraj sinsekvaj jaroj sendis donacon. Eĉ se la sumoj de tiuj laste listigitaj estas regulaj kaj relative altaj, estas malfacile kalkuli kaj plani ĝis ni havos pli da regulaj subtenantoj. Tial tre gravis instigi la uzantojn de la retejo - laŭ siaj ebloj - kontribui al la funkciigo kaj nutrado de la retejo.

REGULAJ SUBTENANTOJ BEZONATAS

Por daŭrigi nian laboron, ni bezonas regulan enspezon. Jam sufiĉus, se kelkcentaj esperantistoj decidus dediĉi ĉiujare malgrandan sumon al la subteno de nia paĝaro.

Do, iĝu unu el niaj regulaj subtenantoj, por minimume tri jaroj!

Flankenmetu ĉiumonate la prezon de kelkaj kafejoj, glaciaĵoj aŭ cigaredoj kaj sendu la sumon al ni jarfine.

Jen la FORUMA parto, kie eblas anonci vian engaĝiĝon.

<http://edukado.net/komunumo/forumo?f=536&p=1>

Helpu nin helpi vin. **La pageblojn vi povas trovi sur la paĝaro:** <http://edukado.net/prie/subteno>

FINANCOJ DE LA FONDAĴO INTER 2009-2015

Temo	2009	2010	2011	2012	2013	2014	2015	Rimarkoj pri
Individuaj donacoj	217	17	48	20	39	87	84*	
Donacoj de grupoj	6	2	1	0	11	14	16**	12-foje la sama el BE
Novaj sponsoroj	15	3	2	0	1	6	3	Ekde 500 eŭroj
Jarkomenca bilanco		17581.22	12910.54	13703.04	12908.5	13357.23	19394.66	
Donacita sumo en €								Detalojn vidu fine
El tio donita por Poznan						2821,25	2300,00	
Por KER-subvencio						590	0,00	
Por la libro de Mila						2600	0,00	
Por Grundtvig						11200	2950,00	
Cetero						3704,91	9589,19	
Entute	32638.86	4461.54	3924.02	3276.08	5625.58	9716.16	14839,19	
Aliaj enspezoj en €								
Banka interezo		155.7	249.52	168.49	168.18	156.41	98,09	
Elspezoj en €								Detalojn vidu fine
	-15057.64	-9287.92	-3381.05	4239.12	-5345.03	-2275	-15505.10	-10043,31
Jara bilanco						6037.47	4893,97	
Tutbilanco jarfine en €	17581.22	12910.54	13703.04	12908.49	13357.23	19394.66	24256,62	

* Fakte nur de 48 diversaj lokoj kaj personoj

** ESPERANTO 3000 VZW (BE) 12-fojojn, Esperanto, Culture et Progres (FR), Centre Culturel Esperanto Touraine (FR) kaj Esperanto-Gruppe Unterweser e.V. (DE) po unu fojo.

DONACOJ POR EDUKADO.NET EN LA JARO 2015

Klarigoj de la koloroj: Subtenoj por la studentoj de Poznan / regulaj subtenoj

	Nomo	Lando	Sumoj		Dato	Maniero
			ĝiritaj	netaj		
1	Heinz Wilhelm SPRICK	Germanujo	30	30	2015-12-30	Rabobank
2	Grażina Opulskienė	Litovujo	30	30	2015-12-29	UEA
3	Bert de WIT	Nederlando	250	250	2015-12-28	Rabobank
4	Roger Van den Bleeken	Belgujo	40	40	2015-12-28	UEA
5	Monique Arnaud	Francujo	100	100	2015-12-26	UEA
6	Hazel Green	Aŭstralio	100	94,45	2015-12-20	PayPal
7	Ingebjørg Rambjør (regula jara subteno)	Norvegujo	1000	1000	2015-12-18	Rabobank
8	Edmond PLUTNIAK	Francujo	50	47,95	2015-12-17	PayPal
9	Sten Svenonius	Svedujo	30	30	2015-12-17	UEA
10	Magdaléna Feifíčová	Slovakio	20	20	2015-12-15	UEA
11	Katja Lödör (jara subteno)	Belgujo	200	200	2015-12-15	UEA
11	Esperanto-Gruppe Unterweser e.V.	Germanujo	50	50	2015-12-15	Rabobank
12	Scott Turton	Usono	30	28,48	2015-12-14	PayPal
13	SYLVIE PLANTIER	Francujo	50	47,95	2015-12-14	PayPal
14	Paulo Sergio Viana	Brazilo	100	94,45	2015-12-14	PayPal
15	Robert Bogenschneider	Finnlando	240	240	2015-12-14	UEA
16	Magdaléna Feifíčová	Slovakujo	12	12	2015-12-14	Rabobank
17	Patrick Morando	Italujo	30	30	2015-12-14	Rabobank
18	Synnöve Mynttinen (monata subteno)	Finnlando	200	200	2015-12-10	Rabobank
19	Ingebjørg Rambjør	Norvegujo	200	200	2015-12-08	UEA
20	ESPERANTO 3000 VZW	Belgujo	10	10	2015-12-02	Rabobank
21	Margaretha Symoens	Belgujo	10	10	2015-12-02	Rabobank
22	ANJA KUHANEN	Finnlando	100	100	2015-11-16	Rabobank
23	John Murray	Britujo	100	96,25	2015-11-10	PayPal
24	Synnöve Mynttinen (monata subteno)	Finnlando	200	200	2015-11-10	Rabobank
25	Ineke Emmelkamp	Nederlando	30	30	2015-11-06	Rabobank
26	ESPERANTO 3000 VZW	Belgujo	10	10	2015-11-04	Rabobank
27	Margaretha Symoens	Belgujo	10	10	2015-11-04	Rabobank
28	Didier Loison	Francujo	100	96,25	2015-10-26	PayPal
29	Erzsébet Szilágyi Gergye	Hungarujo	20	20	2015-10-12	Rabobank
30	Synnöve Mynttinen (monata subteno)	Finnlando	200	200	2015-10-09	Rabobank
31	Alex Santos	Brazilo	10	9,13	2015-10-07	PayPal
32	ESPERANTO 3000 VZW	Belgujo	10	10	2015-10-02	Rabobank
33	Margaretha Symoens	Belgujo	10	10	2015-10-02	Rabobank
34	Gisela Macioszek	Germanujo	100	100	2015-09-17	Rabobank
35	Synnöve Mynttinen (monata subteno)	Finnlando	200	200	2015-09-09	Rabobank
36	Lydia Lindla	Estonujo	30	30	2015-09-04	UEA
37	Margaretha Symoens	Belgujo	10	10	2015-09-02	Rabobank
38	ESPERANTO 3000 VZW	Belgujo	10	10	2015-09-02	Rabobank
39	ANJA KUHANEN	Finnlando	100	100	2015-09-01	Rabobank
40	J. Caré (por KUNVOJAĜU)	Francujo	20	18,97	2015-08-26	PayPal
41	Synnöve Mynttinen (monata subteno)	Finnlando	200	200	2015-08-11	Rabobank
42	ESPERANTO 3000 VZW	Belgujo	10	10	2015-08-04	Rabobank
43	Margaretha Symoens	Belgujo	10	10	2015-08-04	Rabobank
44	Aini VÄÄRANIEMI	Finnlando	100	100	2015-07-29	UK
45	Synnöve Mynttinen (por Poznan)	Finnlando	1300	1300	2015-07-09	Rabobank
46	Gaby Tréanton	Francujo	20	20	2015-07-29	Rabobank
47	Enikő Zengő Sereghy	Hungarujo	50	50	2015-07-23	UK
48	Synnöve Mynttinen (monata subteno)	Finnlando	200	200	2015-07-09	Rabobank
49	ESPERANTO 3000 VZW	Belgujo	10	10	2015-07-05	Rabobank
50	Margaretha Symoens	Belgujo	10	10	2015-07-05	Rabobank
51	Synnöve Mynttinen (monata subteno)	Finnlando	200	200	2015-06-09	Rabobank
52	ESPERANTO 3000 VZW	Belgujo	10	10	2015-06-02	Rabobank
53	Margaretha Symoens	Belgujo	10	10	15-06-02	Rabobank
54	Nancy Fontannaz (jara subteno)	Svislando	191	191	2015-05-15	Kontante
55	ESPERANTO 3000 VZW	Belgujo	10	10	2015-05-12	Rabobank
56	Synnöve Mynttinen (monata subteno)	Finnlando	200	200	2015-05-12	Rabobank

57	Margaretha Symoens	Belgujo	10	10	2015-05-12	Rabobank
58	Synnöve Mynttinen (monata subteno)	Finnlando	200	200	2015-04-09	Rabobank
59	Margaretha Symoens	Belgujo	10	10	2015-04-02	Rabobank
60	ESPERANTO 3000 VZW	Belgujo	10	10	2015-04-02	Rabobank
61	L. Brault	Francujo	20	18,97	2015-03-15	PayPal
62	Asocio Inseo (Tuluzo)	Francujo	50	50	2015-03-11	UEA
63	Andrea Schmidt	Germanujo	50	47,95	2015-03-10	PayPal
64	R. C.	Italujo	600	600	2015-03-10	Rabobank
65	Synnöve Mynttinen (monata subteno kaj donaco pro la raporto)	Finnlando	1000	1000	2015-03-09	Rabobank
66	M. M.	Svislando	150	150	2015-03-09	Rabobank
67	VASIL KADIFELI	Turkujo	50	47,3	2015-03-08	PayPal
68	ESPERANTO 3000 VZW	Belgujo	10	10	2015-03-04	Rabobank
69	Margaretha Symoens	Belgujo	10	10	2015-03-04	Rabobank
70	Jennifer Bishop	Aŭstralio	10	10	2015-02-17	Kontante
71	Centre Culturel Esperanto Touraine	Francujo	100	100	2015-02-16	UEA
72	Anonima donaco	Svedujo	736,95	736,95	2015-02-10	Rabobank
73	M. K.	Hungarujo	100	100	2015-02-09	UEA
74	ESPERANTO 3000 VZW	Belgujo	10	10	2015-02-03	Rabobank
75	Margaretha Symoens	Belgujo	10	10	2015-02-03	Rabobank
76	Synnöve Mynttinen (komuna kaso+Suso en Poznan)	Finnlando	1000	1000	2015-01-30	Rabobank
77	Esperanto, Culture et Progres	Francujo	1000	1000	2015-01-23	UEA
78	Leandro T. Abrahão	Brazilo	28	28	2015-01-21	Kontante
79	Felice Sorosina	Italujo	10.	9.17	2015-01-17	PayPal
80	Margaretha Symoens	Belgujo	10	10	2015-01-08	Rabobank
81	A. Pijnacker	Nederlando	25	25	2015-01-07	Rabobank
82	Agnès Lefèvre	Francujo	20	18,97	2015-01-06	PayPal
83	ESPERANTO 3000 VZW	Belgujo	10	10	2015-01-05	Rabobank
84	Gisela Macioszek	Germanujo	100	100	2015-01-05	Rabobank
				11889,19		

*Raportis Katalin Kováts, redaktoro
La raporton aprobis la estraro de la Fondaĵo*

la 31an de januaro, 2016